



Numero 2024:37; oktobro 14.

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: KB. Sume 390 KB

Nepalo refoje invitas

Nia Speciala Ekskurso 2025 en Nepalo, okazonta de la 26-a de februaro ĝis 8-a de marto celas turismigi la partoprenantojn en mondfamaj turismaj lokoj de Nepalo inkluzive de la naskiĝloko de la Budho. Ni havos diversajn esperantajn eventojn por plivastigi nian lokan movadon. En nia evento ĉiuj aĝgrupoj povas facile partopreni kaj ĝui, kaj samtempe kuraĝigi nepalajn esperantistojn. Ni dankas vin pro via kunlaboro kaj se vi havas iujn demandojn pri la programo, bonvole ne hezitu skribi al ni. Pli detale: <https://eventaservo.org/e/5734f0>

Bharat Kumar Ghimire, Prezidanto, Nepala Esperanto-Asocio: nespa.1990@gmail.com

Literatura kurso en Serbio

Serbia Esperanto-Ligo denove organizas retan kurson **pri la Literaturo de Esperanto** por internacia partoprenantaro. Ĝin **gvidos Zlatoje MARTINOV, en Esperanto**. Ĝi konsistos el 12 prelegoj (po unu horo) ekde la unua lundo de novembro 4. La temoj kaj la strukturo de la prelegserio estas la sama kiel pasintjare. Ĝi okazos ĉiun duan lundon (dufoje monate) per la programo *Zoom* kun komenco je la 18-a horo UTC kaj daŭros ĝis la mezo de aprilo 2025. La kurso estas **senpaga** por la partoprenantoj. Kondiĉo estas **minimume** B1-nivela lingvoscio. Aliĝi eblas pere de reta aliĝilo: <https://forms.gle/Ltjk5Vn7rTEAGVky9> aŭ per retmesaĝo al la retadreso: laslo.az@gmail.com (Aranka Laslo).

Nome de la Instruista Sekcio de Serbio, Aranka Laslo

Greziljono aŭtunas - oportunas

La septaga kurso *Aŭtunas* okazos lunde ekde la 21-a de oktobro.

- Renée Triolle el Francio instruos la plej altan nivelon kaj proponas FEI-ekzamenojn.
- Alain Delmotte el Belgio instruos la mezan nivelon kaj la japanan abakon '.
- Frank Lappe el Germanio paroligos komencantojn kaj ankaŭ proponas praktikan Kurson pri Unua Helpo (sukurismo) en Esperanto
- Bernard Bigonnet el Francio gvidos ĥor-kantadon kun *Interkant* kaj metiejon
- Larysa Osadčuk el Ukrainio praktikos kun vi origamon, la japanan paperfaldadon. La infanoj iros al la naĝejo, ludos, sportos kaj preparos sin por la halovena festeto.

Pliaj informoj en gresillon.org/autuno, aliĝo en gresillon.org/aligho.

Esperanto samrajta laŭ EU

Laŭ informo de Etsuo Miyoshi la departemento “Lernejoj kaj Multlingveco” de la Eŭropa Komisiono konfirmis, ke Esperanto estas samrajta kun aliaj lingvoj por la projektoj de Erasmus+ kaj Kreema Eŭropo. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* ĉe <https://sezonoj.ru/2024/09/europo-6/>

Telegrame

Fine de septembro 2024 al la Telegrama kanalo *Esperanto-novaĵoj* aliĝis 426 abonantoj. (https://t.me/esperanto_news). Ĝi nun estas la dua plej abonata Esperanta kanalo en Telegramo. Se vi uzas Telegramon kaj vin interesas novaĵoj pri esperantista agado, aliĝu al la kanalo *Esperanto-novaĵoj*. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2024/09/telegramo-2/>

Kursoj el Rusio

En la 12-a de oktobro ekas du Eo-kursoj per Zoom (la baza A1, A2, B1 — surbaze de la rusa lingvo kaj la mezgrada B2, C1 — plene en Esperanto). Dezirantoj partopreni iun el la kursoj bv. peti pliajn informojn retumante al esperanto-kurso@mail.ru

Hungaraj disertacioj protektendaj

Kultura Esperanto-Asocio (eble en la jaro 2023) transprenis faklaboraĵojn el la libraro de la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko de la Universitato Rolando Eötvös [ELTE]. Unu el la faklaboraĵoj ni (la familio VAHA/WACHA- SCHILLER) petis kaj ricevis de SZILVÁSI László, ĝin mi nun posedas. Poste mi legis informon pri la fakto, ke la tenejo en la domo, kie (interalie) la faklaboraĵoj estis tenataj, estis malplenigita de la domzorgisto, sen anticipa averto, kaj la koncernaj faklaboraĵoj malaperis (escepte de tiu sola, kiu troviĝas ĉe la familio VAHA/SCHILLER). Mi demandas, ĉu eventuale la malaperintaj faklaboraĵoj estas trovitaj, ĉu la domzorgisto aŭ lia superulo iel klarigis provojn iel rebonigi la situacion?

Laszlo Szilvasi

Kursa torento en Francio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Université de Tours

Gvidantonomo kaj aldoninto: Philippe PLANCHON

Loko: Tours, Francio. Vidu ĉe: <https://edukado.net/kursejo?kid=27656>

=====

Nomo: Kurso por progresantoj

Gvidantonomo: Bruno HENRY; Aldoninto: minuski

Loko: Thionville, Francio. Vidu ĉe: <https://edukado.net/kursejo?kid=27664>

UEA aktiva ĉe UN

Aperis la septembra-oktobra numero de nia informilo, en tri versioj: Esperanto, angla kaj franca. Enestas raportoj pri

- UK-Aruŝo
- indiĝenaj lingvaj rajtoj
- esperantologiaj konferencoj en Afriko kaj Azio
- la okazinta en julio Esperanto-Tago.

<https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2024/09/Informilo72-2409-.pdf>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso de Esperanto

Gvidantonomo: Peter Grbec, Aldoninto: peterg

Loko: Izola, Slovenio. Trovu ĝin ĉe: <https://edukado.net/kursejo?kid=27657>

La elmontra ondo

Aperis la elmontra versio de la junia (somera) eldono de la trimonata bitgazeto *La Ondo de Esperanto*. La 35-paĝa demoversio (pdf) enhavas plurajn tekstojn kaj tekstokomencojn el la riĉenhava 136-paĝa 320-a eldono de *La Ondo de Esperanto*, dissendita al la abonantoj antaŭ pli ol du monatoj. Legu la demoversion kaj decidu pri (re)abono por 2024

<https://sezonoj.ru/2024/09/ondo-131/>

En la kulturkronika bulteno ni informas pri la okazanta en Varsovio 20-a Festivalo „Kruĉiĝo de Kulturoj” kun partopreno de artistoj el la Suda Koreio, Insularo de la Verda Kabo, Alĝerio, Malio, Angolo kaj Italio; pri la daŭranta ĝis oktobro Pola-Rumana Kultura Sezono kun eventoj en ambaŭ landoj.

Pionira gazeto, kiu savis nian lingvon de pereco

Antaŭ 135 jaroj, la 1-an de septembro 1889, en Nurenbergo aperis la unua numero de la unua Esperanta gazeto *La Esperantisto*. Legu la liston de la Esperantaj jubileo kaj memordatoj en septembro 2024, kompilitan de Aleksander Korĵenkov, en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉe

<https://sezonoj.ru/2024/09/septembro-12/>

SMG: Jen la ĉiama subskribo de *Ondo*:

Ni estas kontraŭ milito, ni estas por paco! La retejo por vi: <https://sezonoj.ru/>

Ĉeestis influaj membroj de la brazila movado kaj inter ili Adonis Saliba, la teamo de EASP, James Piton komitatano B, kaj Fernando Maia - vicprezidanto de UEA.

Pluraj esperantistoj kontraŭas la agadon de BRICS, ĉar estas en la grupo kelkaj diktatorecaj landoj kaj ankaŭ pro tio, ke Ĉinio estas komunisma lando. Mi klarigis, ke BRICS ne estas politika grupo, sed komerca grupo. Mi menciis ankaŭ la reziston de

kelkaj esperantistoj pri UK-oj realigitaj en Ĉinio kaj Kubo pro komunismo kaj Tanzanio pro la kontraŭ-geja leĝo. Ĉiuj ĉeestantoj konsentis, ke vera esperantisto ne havu antaŭjuĝon kontraŭ iun ajn lando pro la stato de ĝia registaro. Ni estas esperantistoj kaj akceptas homojn de ĉiuj landoj. Fine, laŭ instigo de Adonis, mi montris nian paĝaron <https://brics-esperanto.org/eo/> kaj invitis ĉiujn viziti ĝin. La sinteno porti Esperanton al BRICS estis bone ricevita. Al ni ne eblas antaŭvidi ĉu tiuj registaroj interesiĝos pri Esperanto aŭ ĉu ili daŭre uzos la anglan.

Emilio Cid, Brazilo kaj Ĉielismo, Ĉinio.

Kondolenco pri s-ro Moriŭaki Jasumasa

S-ro Moriŭaki (sumoo-nomo Osha) subite forpasis la 5-an de aŭgusto, la duan tagon de la 109-a Universala Kongreso en Aruŝo en Tanzanio. Unu jaron antaŭe li fariĝis rulseĝulo, sed li neniam perdis kuraĝon partopreni en diversaj Esperanto-kunvenoj. Post la UK en Tanzanio li planis vojaĝi eĉ al Madagaskaro por renkonti esperantistajn amikojn. Mi plej laste renkontis lin komence de junio dum la Kjuŝu-Kongreso kaj ni kune vizitis la kastelon Kumamoto. Li estis diligenta partoprenanto en la Internacia Esperanto-Sumoo. Li estis motoro de la movado en Kjuŝu.

En 2003 s-ro Moriŭaki trovis artikolon pri Esperanto en la angla ĵurnalo *Nagasaki Press* eldonita en 1902. Tiu ĉi artikolo estis la plej frua mencio pri Esperanto en Japanio. Tiun artikolon skribis la franco Alphonse Mistler (1873-1953), kiu instruis fizikon kaj kemion en kolegio Nagasaki. Inluite de sia frato, li lernis Esperanton. Li eĉ ricevis leteron de Zamenhof, kiu kuraĝigis lin instrui ĝin en Japanio.

HORI Jasuo

Printempa reta kurso sukcese finiĝis

Krom UK 2025 en Brno, ĈEA esploris printempe novan kampon - instruadon de Esperanto per Interreto. Danke al la komuna laboro precipe de Milan Kolka, de la pedagogia sekcio (Miroslav Malovec, Mirka Tomečková, Jana Melichárková), de Josef Kalčík kaj de Pavla Dvořáková oni sukcesis prepari kurson gvidotan de Milan Kolka kaj certigi sciigon pri ĝi uzante *Facebook* kaj retejon.

===== vortoj: 1250 =====



Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de

TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj (ĝis 30) legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La unuaj tridek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn, kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.